

MAR 9 1920


2214 F

AMERIKA ESPERANTISTO

JAN.--FEB. 1920



OFFICIAL ORGAN OF
THE ESPERANTO ASSOCIATION
OF NORTH AMERICA



courtesy of S-ro Robert Blackstone, Gen. Del., Portland, Me.

SOME OF THE MONTREAL KONGSANOJ

- | | |
|------------------------------|-------------------------------|
| 16: Mr. Louis Abramson | 24: Mr. H. I. Keyes |
| 12: Mrs. Thomas D. Baggar | 23: Mr. G. Winthrop Lee |
| 8: Mr. C. F. Bardorf | 26: Dr. D. O. S. Lowell |
| 9: Mr. A. P. Beauchemin | 21: Mr. B. Pickman Mann |
| 14: Mr. Robert E. Blackstone | 6: Miss E. J. Meriam |
| 5: Mrs. Randolph Bolles | 11: Mr. James F. Morton, Jr. |
| 20: Mr. Richard Carter | 7: Mrs. Edward S. Payson |
| 27: Mr. Ernest F. Dow | 4: Pres. Edward S. Payson |
| 18: Miss Daisy Flanders | 10: Mr. John C. Pellett |
| 22: Mr. Norman W. Frost | 1: Dr. H. D. Phizicky |
| 13: Mr. Charles Fyfe | 2: Dr. J. L. Roseboom |
| 17: Miss Jennie Goldings | 20: Mr. Jos. Silbernik |
| 28: Mr. Henry W. Hetzel | 19: Miss Leonora F. Stoeppler |
| | 15: Miss S. B. Terk |
| | 29: Mr. G. F. Warner |

Amerika Esperantisto

American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

A true translation of the non-English portion of this magazine filed with the Postmaster, Boston, Mass.

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)
WEST NEWTON, MASS.

One Dollar a Year.

Du Spesmiloj Jare.

Single Copy Ten Cents.

VOL. 25

JANUARY, 1920

No. 4

To members of the E. A. N. A. and
to all interested in the International Language

The Central Office of the Association is now facing a crisis. The only sources of revenue for the Central Office are book sales, magazine subscriptions and advertising, and membership dues. Together these give a total approximating \$1200.00 per year. This sum can not cover our expenses. The cost of the magazine alone at present rates is about \$70.00 per 16 page issue, a yearly expenditure which absorbs all our income outside of book sales. Besides this there are expenditures for rental, postage, addressing, office stationery, etc., and the large and increasing correspondence which makes up the work of a propaganda headquarters for a continent. This work cannot be well attended to by unpaid, irregular work, however much of time and effort one may wish to volunteer. To meet the situation our congress of 1917 instituted a two years' guarantee fund which expired Dec. 31, 1919. On a new fund voted for by the Montreal Congress, guarantors' subscriptions have not reached \$600.00 and unless the sum of \$1000.00 is guaranteed, all subscriptions will be void. In that case the magazine will have to be reduced to a mere monthly leaflet for the rest of the year or the Central Office and the entire organized work of the E. A. N. A. abandoned. At this time the opening of relations with Europe again offers use for Esperanto; the common interests of the nations are bringing them every day nearer a necessity to adopt some common language. If you have at heart the interests of our organization, of the language, or of world accord, it is your duty, even at some sacrifice, to support the cause of Esperanto in America. We therefore ask you to subscribe what you can and to subscribe **now**.

Ernest F. Dow, Sec.

MAJOR YEMANS

It is hard to realize that the genial, kindly figure known to most members of E. A. N. A. as "Doctor Yemans," no longer fills his important roll in our Esperanto life. How, indeed, at this time can we do without the unfailing support, the powerful influence, and the unswerving devotion which he brought to Esperanto during more than 12 years of service to the cause.

Some of our active Esperantists today remember the tour of General Leonard Wood and his party thru Europe, returning from the Philippines, when Dr. Yemans, then a member of General Wood's staff, was able to secure many unofficial personal courtesies both for himself and the rest of the party, thru his friendship with European officials of every rank, — friendship gained thru a common knowledge of Esperanto.

How many remember that it was due to the efforts of Dr. Yemans that the U. S. Government appointed an official representative, in the person of Major Straub, to the Dresden International Congress in 1908? Major Straub, an army surgeon, was appointed thru the War Department, and was the second official emissary to represent a nation at an Esperanto Congress, the first having been the representative of Belgium the previous year in Cambridge. The appointment, with Major Straub's consequent official report, formed a most important bit of propaganda for our movement.

In 1910, at the International Esperanto Congress in Washington, D. C., Dr. Yemans was again in the forefront with those who made the Congress the success it was, and endeared himself to Europeans and Americans alike. Many of us highly prize the intimate photo of him with the late "Majstro" and Mrs. Zamenhof, taken in one of Washington's beautiful garden spots.

During his station at Fort Wayne, Detroit, Mich., in co-operation with Dr. Sigel, the movement in Michigan flourished as never before, and his orders to the Philippines caused great regret to the Detroit samideanoj.

It was after the sudden death of Mrs. Yemans in Manila, that the Doctor returned again to the States, this time making his famous trip thru the Orient largely in the interests of and by means of Esperanto. Wherever he stopped in China and Japan, he was welcomed most cordially by the Esperantists, and met the prominent propagandists of the East, who organized enthusiastic meetings in his honor. Of this trip he wrote: "My experience with Esperanto during my travels again demonstrated to me how valuable Esperanto is for "vojaĝantoj" and how much those miss who do not possess a knowledge of the "kara lingvo."

Upon his arrival from the Orient, to the great delight of the California Esperantists Dr. Yemans was stationed near San Francisco, and was soon taking an active part in all the plans for the 1915 Congress, when suddenly he was picked up by the War Department and deposited on one of the historic old fortresses in Boston Harbor, where

he remained safely, in spite of all the protests of the California Esperantists to the "powers that be," until the Congress had passed into history.

Again in 1916 we find him back in California, with his post at Alcatraz near San Francisco, until his retirement from active duty some months ago. The writer has a vivid picture of him last fall at the convention of the Kalifornia Rondaro, where in spite of poor health, plainly manifest, he outlined plans for propaganda work and for greater activity in the State, as usual not sparing himself in any way in the work of carrying out the details.

Thus the news of his passing comes with even greater force to his hundreds of friends, most especially to his Esperantist co-workers. For in Doctor Yemans, E. A. N. A. has lost one of the best type of propagandist — quiet, sincere, forceful — and one of the most capable officers it has ever been our privilege to claim. The gap he leaves can not be filled, but may his example inspire us all to more earnest and willing efforts for the cause he loved and to which he so assiduously devoted himself to the last.

— I. M. H.

DEK-DUA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Hago, 8-15 Aŭgusto 1920

Dua Komuniko

Kongressemajno.—La loka komitato, ricevinte plendojn pri la maloportuneco de la unue elektita semajno (unua semajno de septembro), pro kio multaj samideanoj el la publika instrua mondo ne povus partopreni en la kongreso, decidis ŝanĝi la datojn en 8-15 Aŭgusto. Ĝi ne decidis tion facilanime, ĉar la laboroj de la enloĝiga komisiono fariĝos multe pli pezaj, pro tio, ke en julio kaj aŭgusto, la vakanco-monatoj, Hago enloĝigas multajn gastojn.

Kongresejo.—Mi ĵus ricevis ĝojigan komunikon de la koncernata ministro, ke li cedos al ni, por la grandaj kongreskunvenoj, la plej malnovan kaj historian salonegon el Hago, nome la "Ridderzaal" (Salonego de l' Kavaliroj), sub kelkaj plenumotaj kondiĉoj. Precipe de niaj eksterlandaj amikoj venis la instigo klopodi akiri la Pacpalacon, se ne, tiam la salonegon de l' Kavaliroj. Ĉar la estraro de la Carnegie-fondaĵo, kiu administras la Pacpalacon, ne cedas la palacon por aliaj celoj ol por oficialaj packongresoj, tuta nia espero estis je la Salonego de l' Kavaliroj.

Honora Komitato.—Ĝis nun ni sukcesis varbi por nia honora komitato la jenajn konatajn personojn:

S-ino S. van Rees-Broese van Groenou.

S-ino E. J. Wijnaendts Francken-Dijserinck.

S-ro Mr. J. Patijn, urbestro, kiu fariĝos honora prezidanto.

S-ro Mr. J. B. Bomans, Roman-Katolika parlamentano, skabeno en Haarlem.

S-ro W. K. Brevet, Direktoro de la Residentiebank.

S-ro Prof. D-ro D. van Embden, liberaldemokrata senatano, prof. de sociologio kaj statistiko ĉe la Amsterdama Universitato.

S-ro D-ro H. E. van Gelder, Urba arkivestro.

S-ro Prof. D-ro A. F. Holleman, profesoro de kemio ĉe la Universitato de Amsterdam.

S-ro H. van Kol, Socialdemokrata senatano.

S-ro H. Koppel Jr., Eks-prezidanto de la Haga Komerca Ĉambro.

S-ro H. Ch. G. J. van der Mandere, pacifista ĵurnalisto kaj literaturisto.

S-ro F. J. van Paasschen, Direktoro-Cef-redaktoro de la ĉiutaga gazeto "De Avondpost."

S-ro D-ro F. E. Posthuma, Eks-Ministro de Agrikulturo, Industrio kaj komerco, Direktoro de la mutuala kooperata labordonanto-societo "Centraal Beheer."

S-ro Mr. D-ro H. J. Romeijn, Eks-skabeno.

S-ro D-ro J. Schoemaker, Kirurgo ĉe la Urba Malsanulejo.

S-ro Mr. J. M. van Stipriaan Luiscius, advokato kaj prokuroro, aŭtoro de "Karaktero."

S-ro Nico van Suchtelen, verkisto.

S-ro Justus Tal, Superrabeno en Utrecht.

Financoj.—Kompreneble la tempo inter la apero de la unua kongreskomuniko kaj la forsendo de la dua estis tro mallonga por povi esperi gravajn rezultojn. Kelkaj Nederlandaj samideanoj jam sendis siajn kotizojn, faris mondonacojn aŭ enskribis por la garantia fundo (enskriboj akceptataj po 25 guldenoj).

Mi esperas, ke la eksterlandaj samideanoj komencos de nun sendi siajn kotizojn, event. mondonacojn, kun klarigoj al la Residentiebank. Enskriboj por la garantia fundo adresotaj nur al la sekretario-kasisto.

La kongressekretario,

J. L. Bruijn.

ESPERANTO OR ENGLISH

For those who tell us "Let the world learn English," le Travailleur Esperantiste gives a few figures.

"About 175,000,000 individuals speak	English,
" 95,000,000 "	" German,
" 55,000,000 "	" French,
" 45,000,000 "	" Spanish,
" 35,000,000 "	" Italian,
" 20,000,000 "	" Portuguese,
" 160,000,000 "	" Russian."

A total of some 585,000,000 out of the 1,700,000,000 inhabitants of the earth.

Any student who has acquired a knowledge of both tongues will agree that to learn English requires at least 10 times the time needed to learn Esperanto to an equal degree.

The comparative difficulty for solution of the world problem stands about thus:— $(1,700,000,000 - 175,000,000) \times 10$ for English, $1,700,000,000 \times 1$ for Esperanto, or in round numbers, as 150 hours is to 17 hours, or 9:1.

Were the acquirement of Esperanto the matter of one or two hours, the English solution would not be impossible, but the learning of even the simplest language is a matter of long patient study.

The masses of the world can never be expected to have the time and inclination to devote an hour per day for five years to the study of an auxiliary tongue but one hour a day for six months is a possibility.

English might become the language of the world, but only as a result of world conquest and forcible imposition. The Russian with its closely allied Slav languages is far more likely to spread over both Asia and Europe as the world's international language. Happily, however, Esperanto is especially strong among the Russians of all shades of political opinion.

LA ALFABETO DE SUKCESO

Bone konsideru, sekve decidu pozitive.
 Kuraĝu fari rajton, timu fari malrajton.
 Pacience suferu provojn.
 Brave batalu la vivbatalojn.
 Ne kunigu vin je la societo de malbonuloj.
 Tenu sankta la honestecon.
 Ne difektu reputacion de aliulo.
 Kunigu vin kun virtuloj.
 Ne malbone pensu.
 Por kia ajn kaŭzo, ne mensogu.
 Amikiĝu kun multaj.
 Neniam ŝajnu tio, kiu vi ne estas.
 Observu bonan manieron.
 Senprokraste pagu viajn ŝuldojn.
 Ne esprimu dubon pri la verdiremo de amiko.
 Riverencu la konsilon de viaj gepatroj.
 Oferu monon plivole ol principojn.
 Konfidu vin mem.
 Uzu vian libertempon por pliboniĝo.
 Ne risku la unua paŝon al malpraveco.
 Gardu zorgeme viajn pasiojn.
 Etendu al ĉiuj bonan saluton.
 Ne cedu al senkuraĝemo.
 Je ĉiuj aferoj estu vi tujaj.
 Fervore laboru por pravo, kaj sukceso estas certa.
 tradukis E. Ohman.

La dommastrino laŭokaze plendis pri la multon da bluzoj kion ŝia servistino sendis al la lavejo.

Atentu, Mario,—ŝi diris—mia propra filino ne ĉiusemajne sendas po ses bluzojn al la lavisto.

Kredeble ne—respondis la servistino, indignega—ankaŭ kredeble ŝi ne promenadas kun policano.

el Boston Ideas—trad. Prujno

GEMS OF ESPERANTO LITERATURE

LA LANDO GOSEN

La limon inter la lando Gosen kaj la dezerto formis du vojoj. Unu estis kanalo por transportoj de Memfiso al la lago Timrah, la alia estis ŝoseo. La kanalo estis ankoraŭ en la lando Gosen, la ŝoseo en la dezerto, kiun ambaŭ vojoj ĉirkaŭis duoncirkle. De la ŝoseo preskaŭ sur ĝia tuta longo oni povis vidi la kanalon.

Sendepende de la artefaritaj limoj, la najbaraj landoj diferencis unu de la alia en ĉiu rilatoj. La lando Gosen, malgraŭ la ondlinia tero, ŝajnis ebenaĵo, kaj la dezerto konsistis el kelkaj montoj kaj sablaj valoj. La lando Gosen havis aspekton de grandega ŝaka tabulo, kies verdaj kaj flavaj kvadratoj estis designataj per la koloro de l' grenoj kaj de l' palmoj, kreskantaj sur la limoj; sur la flavruĝa sablo de l' dezerto kaj sur ĝiaj blankaj suproj la verdaĵo aŭ aro da arboj kaj arbetoj similis erarvagantan vojaĝanton.

Sur la fruktodona tero de Gosen de ĉiu monteto ŝprucis malhela arbareto de akacioj, sikomoroj kaj tamarindoj, de malproksime rememorigantaj niajn tiliojn, inter kiuj kaŝiĝis malgrandaj palacoj kun vicoj de kolonoj, aŭ flavaj terotegitaj dometoj de l' kamparanoj. Ifoje najbare de l' arbareto aperis tute blanka urbeto kun platetegmentaj domoj, aŭ super la arboj peze leviĝis la piramidaj pordegoj de l' temploj, kvazaŭ duoblaj ŝtonegoj punktitaĵoj de strangaj signoj.

En la dezerto post la unua vico de iomete verdaj montetoj elrigardis nudaj altaĵoj, kovritaĵoj de ŝtonegaj fragmentoj.

Sajnis, ke la okcidenta lando, saturita de troo da vivo, kun reĝa malavareco ĵetas trans la kanalon verdaĵon kaj florojn; sed la dezerto, ĉiam malsata manĝegas ĝin en la sekvanta jaro kaj ĝin cindrigas.

La iometo da verdaĵo, forpelita sur la ŝtonegojn kaj sablojn, sin krampis al la malpli altaj lokoj, kien per kavoj boritaj tra la ŝoseo oni povis alkonduki akvon el la kanalo. Kaj tiel inter la nudaj altaĵoj, najbare de la ŝoseo, trinkis la ĉielan roson kaŝitaj oazoj, kie kreskis hordeo kaj tritiko, vinberujoj, palmoj kaj tamarindoj.

el la ĉapitro de La Faraono.

NOTES

Studying carefully, we can see that a great deal of the grace of style thruout this passage is due to the order of the words, by which the idea flows uninterruptedly from one thing to another. Our customary English would be "concealed oases, where grew, drank of the heavenly dew," that is a jerky broken mental sequence. We should never be afraid to use inverted order permitted by the Esperanto accusative when the style is thereby bettered. Not more than half of the sentences in this quotation begin with the subject, rather the most important part is put first.

FOR THE STUDENT
THE LAND OF GOSHEN

The border between the land of Goshen and the desert was formed of two roads. One was a canal for goods sent from Memphis to Lake Timrah, the other was a highway. The canal was still inside the land of Goshen, the highway in the desert, which both half encircled. From the highway along most its whole length the canal was in view.

Independently of their artificial border lines, the neighbor lands differed one from the other in every way. The land of Goshen, despite the ground's undulations seemed a plain, and the desert consisted of a few mountains and sandy valleys. The land of Goshen appeared a great chessboard, whose green and yellow squares were indicated by the colors of the grain and the color of the palms growing along the borderlines; on the ruddy yellow sand of the desert and on its white peaks the verdure, some group of trees or shrubs, resembled some straggling traveller.

On the fertile soil of Goshen from every hillock burst forth a dark copse of acacias, sycamores, and tamarinds, from afar reminding one of our own lindens, amid which were concealed small palaces with rows of columns on the yellow earthcovered hovels of the countrymen. Sometimes close by the grove appeared all in white a little town with flat-roofed houses, or above the trees rose ponderously the pyramidal pylons of the temples like a pair of stone blocks arrayed with curious signs.

In the desert from beyond the first row of slightly green hills looked forth bleak heights overlain with huge rock fragments.

It seemed as if the western land, supersaturated with life, with regal generosity threw its verdure and flowers across the canal; but the desert ever insatiate devoured them next day and reduced them to ashes.

What little verdure there was, driven upon the rocks and sands, crouched in the less lofty spots, whither by holes bored thru the road-bed one could lead water from the canal. And thus amid the bare heights nearby the great road, hidden oases drank of that heavenly dew, and there grew barley and wheat, grapevines, and palms and tamarinds.

from Kabe's Faraono, chap. 1.

NOTES

Vojoj—our translation cannot be the literal “was formed by two ways” since “ways” has a confusing double meaning; “roads” is inexact, but carries the sense; there is a wealth of synonyms in English but mostly inexact or figurative; “path of travel”; “channel”, etc. **Soseo**—a built road not merely a track, hence generally straight and raised for drainage. **Sendepende de**—many would have used **krom**, the effect of the longer phrase is much more pleasing to the ear. **Saka tabulo**—to any who have been in irrigated regions the analogy is striking; the same effect can be seen from the heights bordering

wide reaches of the Connecticut valley. **Koloro de l' grenoj**—more than one kind of grain or at different stages, hence the color varying from one patch to the next. The elision of the **a** in **la** before **grenoj** is not customary at the present day tho permissible. **Flavruĝa**—literally yellow-red, probably between pink and orange. **Aŭ**—“or”, we have treated the following phrase as appositional tho **verdaĵo** might include any green thing, cacti or grasses. **Erarvaganta vojaĝanto**—perhaps lost but more probably strayed from the path or straggling aimlessly hither and thither, hence appearing in out of the way spots. **Ŝprucis**—“spurted up” a rather strong expression; the impression intended is probably the sudden catching of the eye by the violent contrast. **Rememorigantaj**—notice the **re**; **memori** means “to memorize, **rememori** “to call back out of the memory.” **Terotegitaj dometoj**—literally “earth-protected houses”; this may mean earth-roofed or quite as likely the entire house was banked and roofed with earth more or less like the sod huts of our prairies. **Elrigardis**—“looked forth”; the figurative use vastly increases the strength of the passage. **Duoblaj ŝtonegoj**—perhaps “twin stones” massive, solid, and “just alike.” **Cindrigas**—“reduce to ashes”; not to “cinders.” **Malpli altaj lokoj**—just why this is not **pli malaltaj**, “the lower places” I do not understand unless the term is used to include these. **Trinkis la ĉielan roson—tamarindoj**—see above.

We have received nos. 1, 2, 3, and 4 of the Weekly Metergram. As Esperantists, we are already committed to the metric program. It sounds as if the metric program was approaching a recognition of Esperanto's worth when their leading article says:

“Standardized means of communication have become indispensable to human kind. The airplane, the telegraph and wireless all annihilate time and space. —As the electrical expert, A. E. Kennelly says: “From the moment that a wireless telegraph key is closed at one point on the earth's surface to the moment when the outgoing invisible electric wave arrives at the antipodes at the opposite side of the globe, is a little more than a fifteenth of a second. Only the Metric System can possibly survive on a fifteenth-of-a-second globe.” —This is indeed a world-wide language of quantity available and readily understood.”

Just think it over, brothers, there is more than quantity to communicate, isn't there? What use is “one gram of —?—?—?”

LA RONDO FAMILIA

(Oni proponas uzi tian paĝon por aferoj interesaj al la mondesperantistaro. Kompreneble, ĝi koncernos statistikon, kiu helpos respondi al la ofta demando de la ne-esperantistoj: “Kiel progresas la lingvo?” Bonvole precizigu ĉiujn la donatojn, ĝis la fina cifero.)

Ciu Esperantisto sendu al “Amerika Esperantisto” la nomon de la specialaĵo en kiu li estas sperta aŭ lerta, por ke estu presita en la ĵurnalo interesa kaj valora “KIEN SKRIBI POR EKSCII ĈION.”

ESPERANTA PAROLEJO

En sed ne pri Esperanto : ne pli ol 500 vortoj | por iu senpage : nomo kaj adreso postulataj
 In but not about Esperanto : not over 500 words | free to all : signature and address required

MIZEREGO EN HUNGARLANDO

18 Jan., 1920. La Hungara Esperanto Servo raportas el Budapeŝt, la bela ĉefurbo kun miliono da loĝantoj ke tie estas terura mizero. Hungarlando, kiu antaŭe nutris Mezeŭropon kaj fidele batalis apud ĝiaj—cetere ne amataj ligoj, demetis en 1918 la armilojn fidante en la realigo de la Wilsonaj principoj. Detruiginte post revolucio, bolŝevisma regado, kvarmonata ĉion forportinta rumana okupo, nun la paco fine forprenas ĝiajn plej fruktodonajn, minej- kaj arbarregionojn, kie milionoj da hungaroj venis sub fremdan regadon. Tiuj partoj estas ne nur politike, sed ankaŭ ekonomie baritaj. Ne venas nutraĵo, hejtaĵo, krudmaterio! La mono valoras la centonon! (1 krono = 1 svisan centimon!) . La fabrikejoj, negoĉejoj ne povas labori. En Budapeŝt estas 160,000 senlaboruloj (proporcie kvinoble pli ol en Vieno!), kun la invalidoj kaj nelaborkapabluloj 270,000, kun ties familianoj duonmiliono sen vivsubteno! El 100,000 sensŭaj infanoj en 1919 povis nur 15,000 ricevi ŝuojn! (Paro da ŝuoj = K.2,800). El 19,000 novnaskitoj en Budapeŝt pri 15,000 ne povis zorgi la patrinoj. Por 7,000 venis vindilo el Svislando, sed 8,000 eĉ hodiaŭ estas vinditaj en papero kaj ĉifono. Familioj havas komunan ŝuon kiun uzas tiu familiano, kiu devas foriri. Frosto, pluvo, malsanoj atakas la urbon. Nur riĉuloj povas aĉeti. Mankegas nutraĵo, vestaĵo, kaj medikamentoj! Venis jam amdonacoj el Usono kaj Holando, sed ĝi devus esti pli ampleksa! Nur rapida kredito al Hungara Komercaro, amdonacoj povus helpi! Pro la kursdiferenco jam kelkaj dolaroj estas helpego, kaj la "American Relief Administration, 115 Broadway, New York City," akceptas mondonacojn, por kiuj ĝi donas per ĝia Budapeŝta filio nutraĵojn al la hungaraj adresatoj. Ĉiu do povas sendi al sia hungara parenco aŭ amiko helpon! kiu ne havas iun tie, sendigu al la Hungara Esperanto Servo, adr. Paŭlo Balkanyi (Komitato por Lingvo T.) Budapeŝt VI, Hajos — u 15. II. 2 per "A.R.A.", New York! Helpu! Ĉar miloj mortos! Instigu la riĉulojn al donaco kaj oni donu krediton al hungara komerca vivo aŭ ŝtato! Per tio ĝi povus fariĝi profitdona lando! Usono postulu la aplikon de Wilsonaj principoj en dispecigita Hungarlando. Helpegu ĝis ne estas malfrua! Karaj Samideanoj! Helpu! Aperigu ĉie tiun artikoleton en "Am. Esp'isto" kaj alvoku ĉiun legonton ke ili klopodu ĝin publikigi en ĉiu nacia ĵurnalo de Nord' Ameriko (se ĝi ie aperos oni bonvolu al mi sendi 2—3 ekz.!) oni disvastigu ĝin en ĉiuj rondoj! Ĝi estas ankaŭ propag. por Esper.! Per Esp. por praktikaj celoj! Helpu! Korege dankas Via sincera

Paŭlo Balkanyi, Budapeŝt, II Hajos — u. 15, II. 2, Hungary.

PAROLEJO

ĈU ILI ESTAS KULPAJ?

En ĉiuj militintaj ŝtatoj oni serĉas tiujn, kiuj estas kulpaĵ pri la malfeliĉo, la mizero, sekvintaj la militon. Ne nia afero estas, esplori la akuzojn; tion faru la politikuloj. Sed prave ni povas eldiri, ke ili, kiuj pleje suferas, estas certe senkulpaĵ—la infanoj, precipe tiuj en la landoj mez-eŭropaj, ekonomie venkitaj, rompitaĵ.

Ili, la pleje sed senkulpe punitaj de la sorto, niaj infanoj, perdintaj la patron per malamika kuglo, havantaj malsanan patrinon nekapablan perlabori la plej necesajn ekzistrimedojn, ili ja ne scias kiel plenaĝuloj heroe elteni la mizeron!

Ili deziras vesti sin kontraŭ la malvarmego, ili volas dormi en liteto sole, ili petegas manĝaĵojn por satigi. Anstataŭ tio ili malhavas la plej necesajn vestaĵojn, ili logas multope sur putriginta pajlo en nehejteblaj keloj, ili matene levigante ne scias, ĉu oni donacos al ili paneron dum la tago—amase ili mortas pro malvarmo, malsano, malsato!

Imagu nudpiedan ĝemantan infaneton, pro glacia vento tremante stari en pordega niĉo, etendi el disŝiritaj manikoj al vi frostigitajn manetojn, kaj senvorte per malespera gesto peti de vi helpon: ĉu komplete ne via koro kuntirigigas, viaj okuloj ne pleniĝas per larmoj, via mano ne serĉas la monujon? Sed por kio helpos mono! Oni nenion ja povas aĉeti per ĝi, ĉar aŭ la plej necesajoj ne ekzistas, aŭ estas nepageblaj per almozo.

Pro la interna ideo de Esperanto, la Esperantismo, nur bonaj homoj estas veraj Esperantistoj—al ili mi dediĉas tiujn ĉi liniojn. Ili povas helpi, ili helpos!

La eksterlando, precipe la neŭtrala, jam gastigis ĉe si multajn infanojn el la aŭstria ĉefurbo, Wien, kiuj ja efektive estas plej bedaŭrindaj. Sed ankaŭ tiuj el la aŭstria provinco Stirio, montara lando kun malmulte da agrikulturo, precipe tiuj el ĝia ĉefurbo, Graz, industria urbo kun 200,000 enloĝantoj sopiras ĝui almenaŭ por kelkaj semajnoj vivon en pli bonaj cirkonstancoj. Tial la “Esperanto-Societo por Stirio” petegas:

Esperantistaj sciotoj kaj grupoj: 1e: Demandu viajn anojn, ĉu ili konsentus gastigi ĉe si por kelkaj printempaj aŭ someraj semajnoj tiajn malfeliĉajn infanojn 8- ĝis 14-jarajn el nia urbo senpage, skribu al ni kiom da knaboj kaj knabinoj povus ĝui ĉe ili homindan restadon, kaj kiam ni povos konduki ilin for de la mizero. 2e: Anoj kiuj mem ne povas akcepti en sia hejmo infanojn, ankaŭ povas helpi nian aferon, oferante kelkajn monerojn por certigi la kostojn de l' preparo, vojaĝo, dumvoja nutrado kaj akompano. Mondonacojn aŭ almenaŭ promesojn vi bonvolu kolekti por ni kaj konservi, ĝis ni sciigos vin en okazo de bezono, kien vi sendu la sumon. Estas projektite, destini svisan bankon por tiu ĉi celo.

Ricevinte inviton, ni komunikos ĝin al la urbestro, kiuj elserĉos la plej indajn infanojn kaj prizorgos la vojaĝon. Antaŭ la forveturo ili devos lerni Esperanton, tiel ke ili povu interbabili kun malsamlingvaj gastigantoj. Akompananto certe trovos okazon, fari ĉe

vi paroladojn en Esperanto, tradukotan en nacian lingvon, pri la ekonomia situo de l' germana Aŭstrio

Eble vi sukcesos interesigi ankaŭ ne-Esperantistojn pri nia "Porinfana Helpe." La tuta afero servos unue la malgrandulojn—due la propagandon de Esperanto, montrante, ke Esperanto ne estas utopio, kaj la Esperantistoj ne nur idealistoj aŭ nur komercistoj, sed antaŭ ĉio—homamantoj.

Duble donas, kiu rapide donas! Tial ne hezitu, serioze pri-pensi nian petegon!

Karlo Bartel, Sek.

Dr. Vilhelmo E. Dietl, Prez.

"Esperanto-Societo por Stirio."

Frederiko Krejci,

Prof. h. c. de Esp. ,Del. U. E. A

RECENSA FAKO

Esperanta Legolibro: 2nd ed.—This is not the well known book by Kabe, but a publication of the Eldona Akcia Societo Otava, Helsingfors, Finland. As the second edition is dated 1919 and the preface thereto says "Dum unu jaro estas elvendita la unua eldono—3000 ekz.—" we have presumptive evidence that this is a worth while book. It abounds in variety and in length of article. Many of the articles are by the compiler, and many have been selected from such standard writers as Zamenhof, Kabe, Privat and others of familiar name, with naturally a fair number from the Finnish samideanoj. Acknowledgement is made of the assistance and advice of the late president of the Norwegian Esperantist League, Bruno Riefing. Altho originally this reading book was intended for Finns, the author says: "Kun kontenteco mi vidis, ke ĉi tiu legolibro...montriĝis konvena ankaŭ por alinaciuloj." Note some of the titles: Fabelo de Esopo; Esperanto kiel tradukilo; Vojaĝo de Esperanto (I. Preparaj laboroj; II. Letero al delegito; III. En la haveno; ktp., ĝis XII. La reveno); El la historio de Esperanto; Kiel utiligi Esperanton; ktp. Just the book for the student at the end of his beginners' course and for the spertulo who would study the use of words by Esperantists of accepted authority; hence, a book that almost every sincere Esperantist should sooner or later possess. 112 pages, price 5. Finnish marks; from Akcia Societo Otava, Kauppiaskatu 16, Helsingfors, Finland. L.

Among the new books recently received is a translation from the Finnish language of a work by Linnankoski, "**Batalo pri la Domo Heikkila**," translated by Vilho Setala. The author is considered one of the most eminent modern writers of Finland. The story treats of one grimly determined woman who under pain of disinheritance is wed to a coarse drunkard husband, yet who obstinately retains her affection for a former lover and still preserves her ancestral home, the "Domo Heikkila" even in death. We find here the same contrast of home-love and obstinate stolidity against drink and brutality that is common in many Baltic tales, but unlike most of the other stories, as those of Lagerlof, there is not a smile in this whole book.

The translation is generally clear and intelligible. Some characteristics may seem strange to readers whose native tongue is not that of the translator, but all in all the book does not belie the contention that Esperanto fairly well written by one of any nationality is understood by those of other nationalities. The pages are commendably free from misprints, but there are a few actual blemishes, such as the anomalous *kelkiuj*, *kelkiam*, *kelkiom*, also *alio*, *nune* and *mis*, all of which, it seems to me, would better have been replaced by the words to which the readers of Zamenhof are accustomed. However, neither these nor a slight vagueness in the use of participles and adverbs formed from participles need deter the reader's interest.

The book is published in Helsingfors, Finland, by the Akcia Societo Otava. P.

Received and held for review — Esperanto Opiskeluopas.

Curso Elementar de Esperanto: Carreira e Bemaldo—160 pages, closely printed and well printed in perfect Esperanto; 1 escudo, Silva & Carreira, rua da Asuncao 42. 3, Lisboa, Portugal. This book shows that our Portuguese friends are active and alert and able crusaders for world union. Vocabularies, index, illustrations and tables are all carefully elaborated and inserted to make this a notable work. We recommend that all Portuguese and Brazilian Esperantists and all those in this country expecting to visit Brazil or any of the lands of the Portuguese realm, possess themselves of a copy.

Fraŭlino Suzano: Avsejenko, (Medem). This is a charming quiet and beautiful story; it rejoices in the power of human will. A little orphan girl rises by her own efforts to the full respect of all and to a successful love marriage. The rich brutish landowner, typical of nearly all Russian tales, is here skillfully outwitted by the orphan, so that he plays almost a comedy part. The story is all in fluent unexceptionable Esperanto. 1.50 Marks at Ader & Borel, Dresden 1, Struvestrasse 40, Germany.

Kontrakto de la Ligo de la Nacioj—in English, French and Esperanto, the document given out to the delegates at the International Labor Conference at Washington; 3 f. at the Central Office, 51 rue de Clichy, Paris, France.

Esperanta Dokumentaro, vol. 30, sect. B, Lingva Komitato, 2a aldono al universala vortaro; 1.50 fr. at Central Office, Paris, being the report of Director Cart for July 15, 1914.

Die Sprachen in neuen Europa und das Esperanto by Pillath, also a short summary of the Esperanto grammar in German, being *Die Welthilfssprache* Flugblatt no. 2 at 40. M. per thousand. Ader & Borel, Struvestrasse 40, Dresden 1, Germany.

Mark Twain unufoje donis sian opinion pri la statuo marmora de junulino, kombanta ŝiajn harojn.

“Tre bela,” li diris, “sed ne natura.”

“Kial ne?” demandis oni.

“Ne estas harpingloj en la buŝo,” respondis la observema Mark.

We have to chronicle news of the death of three of our American Esperantists.

Major Dr. H. W. Yemans.

John Clement, formerly of the Boston Society died at Washington, D. C. on January 28th. We have suffered a further loss in the death of his father Edward H. Clement, well known as the Listener of the Boston Transcript, who had taken a lively interest in our movement and whose article about Esperanto on December 24th was to have been the first of a series of such helps. The loss of his son undoubtedly contributed to his death from heart failure February 7th.

Dr. George Macloskie, professor emeritus of biology at Princeton University, one of the earliest enthusiasts for Esperanto in America, died at the age of 85 on December 4th at Princeton.

LA ENLANDA MOVADO

Storm Lake, Iowa—Buena Vista Kolegio anoncas, komenconta kun la venanta lernjaro, instruadon en Esperanto, dank' al fondo donacita de F-ino J. E. Hammand el Schaller, Iowa, por tio.

Berkeley, Cal.—Parolado de S-ro Brewster F. Ames al klubo de viroj en loka paroĥo entuziasmigis la ĉeestantaron. Klaso formiĝas.

Regina, Saskatchewan, Kanado—Post kelkaj preparaj kunvenoj de interesuloj pri Esperanto, estis komencata, la 12an jan., 1920, la "Esperanto-Grupo Regina." Ĉiun lundon konvenas la lernantoj sub la instruado de S-ro W. C. Western. Jam estas dekunu membroj de la grupo, kiu ĉiam kreskas. Ankoraŭ la plej multaj estas lernantoj, sed baldaŭ oni vidos fortan, viveman grupon en Regina.

Bostono—La kutima "5a Sabato" kunveno okazis ĉe ges-roj Smith en Roxbury. Dek ok ĉeestis kaj ĝuis la gustegajn mangaĵojn. Prez. Lee priparolis sian favoran temon, grupkondukadon, kaj ekstarigis iom da diskutado. Oni legis leteron de nia antikva sekretario Roger Goodland, kiun ni esperas baldaŭ reakcepti. La babilado neniam ĉesis ĝis la deknua horo. Venonta kunveno kiu okazos Marton 16 estos tre grava afero. Tiu estos la dekkvina datreveno de la starigo de la "American Esperanto Association." Oni anoncis ankaŭ programon por amuzado dum la apudaj mardaj vesperoj. La aliaj 5aj Sabatoj okazos Majo 29, Julio 31, kaj Okt. 30.

New Zealand—La Laboristaro montras rapide kreskantan intereson pri Esperanto. Procesio de laboristoj je Oktobro 27, 1919 en Auckland, N. Z., portis flagon kun la surskribo: Laboristoj de la Mondo, Unuigu! — **ESPERANTO** — the International Language. Bildon de tiu standardo oni presis en la Auckland Labour News decembron.

We have received circulars from the directors of the fair to be held April 15 to 29 at Basl, Switzerland, inviting the sending of samples.

KLIPLINGS

In Russia interest in Esperanto keeps up. Petrograda Revuo, Feço, and Libera Torento (Saratov) are still being published. Esperanto is being taught in the girl's school of Ekaterinoslav.

from Neue Lodzer Zeitung.

The International Christians' Conference held at Bilthoven, Holland, Oct. 4 to 11 at the call of the Fellowship of Reconciliation (U. S. headquarters 118 E, 28th St., New York) not only adopted Esperanto but resolved that at their next meeting Esperanto should be used as the second language, everything being translated into it and not into any other language.

Le Chretien Libre, a reformist religious and social monthly of Melun, France, is running an Esperanto department. It intends not only to propagand Esperanto but also to use it regularly.

The American Association for the Advancement of Science at its 22nd meeting, Dec. 29 to Jan. 3 in St. Louis, adopted among others the following resolution:

(4). that the president be authorized to appoint a committee on international auxiliary languages to co-operate with a corresponding committee of the International Research Council.

—item from Science, Jan. 9, 1920.

The Magazine of the Children of the Kingdom, vol. 1, no. 1, for Dec., 1919, published at the Bahai Unity House, 120 Charles St., Boston 17, Mass., contains an Esperanto column.

Progreso, organ of the Rhein-Westphalian groups, has discontinued, urging its readers to subscribe to Germana Esperantisto, and Esperanto (Bern) instead, according to a circular dated Jan., 1920.

A letter received from the Verlag Nova Tempo, Gesellschaft m. b. H., Vienna, VIII (Austria,) Leichtensteinstrasse 123, informs us that they plan to publish shortly an Esperanto Chess magazine.

POLIGLOTO

La konata s-ro O— ankaŭ partoprenis en la labor-konferenco en Washington. Li estas lerta lingvisto, ĉar li kapablas en ĉiuj lingvoj**silenti**. Paroli li nur kapablas nederlande. Sendube lia influo tie estis gravega. Ankaŭ li estas sekretario de la "Internationale." Kiamaniere li plenumas tiun taskon?

Oni asertas, ke li korespondas per inko nevidebla.

el Nederlanda Katoliko

Ciu Esperantisto devas legi

ESPERANTO

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio
Internacia monata gazeto tute en Esperanto

16—20 paĝoj de plej bona teksto

Diverslanda kunlaborantaro

Direktoro: **HECTOR HODLER**

Enhavo: Artikoloj de ĝenerala intereso pri nuntempaj internaciaj problemoj, socialaj demandoj, geografio, ekonomio, scienco. — Literaturajoj. — Esperantismo: Artikoloj pri propagando kaj utiligo de Esperanto. — Kroniko. — Tra la gazetaro. — Tra la libraro. — Oficiala informilo de U E A. — Lingvaj Studoj. — Anoncetoj, ktp.

Jara abono: Ordinara eldono, 5 Frankoj. Luksa eldono: 6.25 Frankoj
Senpaga specimeno laŭ peto

Administrejo: Museumsstrasse 14, BERN (Svisio)

“THE WORLD SALESMAN”

*A Monthly International Trade Journal published in Yokohama, Japan,
by an American concern, with sections in English, Russian,
Spanish, Japanese, Chinese and Esperanto*

THE WORLD SALESMAN is the first commercial journal to have drawn attention to the value of Esperanto as the common commercial language. It has a regular Esperanto Section and publishes the names of firms using the international language.

It will keep you posted on World Trade. If you want to do business with the Far East or any other section, IT WILL PAY YOU TO ADVERTISE IN THE WORLD SALESMAN.

Advertising Rates on application. Subscription, \$4.00 per year.

HEAD OFFICE: 76, YAMASHITACHO, YOKOHAMA, JAPAN.

HEAD OFFICE FOR THE UNITED STATES AND CANADA: NEW YORK CITY,
Roderic Penfield, Representative and Correspondent
182 WEST FOURTH STREET.

The COMMON COMMERCIAL LANGUAGE COMMITTEE using the INTERNATIONAL AUXILIARY LANGUAGE ESPERANTO

is prepared to render economical and efficient service to manufacturers and merchants who wish to secure business in countries where it is not easily obtained by ordinary methods.

For further information address
James F. Morton, Jr., Secretary,
211 West 138th Street, New York City.

AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of

The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

CO-EDITORS: NORMAN W. FROST

H. M. SCOTT

MRS. I. M. HORN

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

BERKELEY, CALIF.

Berkeley Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Thursday evenings at 2508 Vine St. Address Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Sec. & Treas., 438 15th St. 19

SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Rondo, meets Third Friday eve., room 124, Chronicle Bldg. F-ino M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Av.

MONTREAL, CANADA.

Montreal Esperanto Society, Group No. 1. Room 13, Tooke Bldg., St. Catherine St. Meets Wednesday evening at 8.00 o'clock.

WASHINGTON, D. C.

La Kabea Esperanto Kbluo meets every Saturday, at 8.30 P. M., at Room 313, Y. M. C. A. Bldg., 1736 G St., N. W., Washington, D. C.

Kolumbia Esperanto Unuiĝo. Public meeting third Wednesday of each month except July and August at Public Library. Club meetings each Wednesday evening except third at 20 Randolph Place, N. W. All Esperantists invited.

CHICAGO ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslav Sobehrad, Sec'y, 1116 W. 19th Place. La Esp. Oficejo. 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate. 19

BOSTON, MASS.

Boston Esp. Soc., 402 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P. M. Miss A. Patten, Sec.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P. M.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg. Miss Emma Sanborn, Sec'y, 16 Conant St.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M.-9 P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P. M.

La Pola Esperanto Asocio, B. Lendo, Sek., 120 29th St.

MANCHESTER, N. H.

Pionira Grupo. Sek., Daisy E. Flanders, 714 Beech St. 19

HEBRON, NEBRASKA.

La Hebrona Grupo kunvenas ĉiun Ĵaŭdon 8 P.M., 650 Olive Ave., kaj ĉiun Dimanĉon 10 A.M., 500 Olive Ave. Roland Jeffery, Pres., Harry Hogrefe, Vice-Pres.

PLAINVIEW, NEBR.

Esperanto-Fako de la "Sola Skolto" (Lone Scout), 500 N. Dearborn, Chicago, Ill. (Revuo por la Ĵunularo. Organizu grupon inter la geknaboj. Granda sukceso. Abonu tuĵ! Ĵare .75; Kvarmonate .25.) Fakestro, Chas. P. Lang, Plainview, Nebr.

HOBOKEN, N. J.

"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

BUFFALO, N. Y.

Buffalo Esperanto Society, A. E. Warren, Pres.; Miss Ray Morris, Sec.; meets Thursday evenings at 60 High St. 19

NEW YORK CITY, N. Y.

The Greater New York Esperanto Society, including all chartered clubs in Manhattan, The Bronx, Brooklyn, Queens, Richmond, Long Island, Westchester County and the New Jersey suburbs, Miss Leonora Stoeppler, Sec., 105 W. 94th St.

The New York Barĉo, or Esperanto supper, is held on the THIRD FRIDAY of every month (6.30 P. M.) Information from secretary.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

PHILADELPHIA, PA.

Phila. Esp. Soc. Miss Marie Knowlan, cor. Sec., 1420 18th St. Meets 4th Fri., Hotel Hanover, 12th and Arch Sts.

Rondeto de Litovo-Polaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanta stelo de Polujo. Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 507 N. York Ave. 19

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art. James McKirdy, Sec., Box 920. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC.

Esperus Esperantists. S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P.M. 19